**Silabo-enigmo:** El jenaj silaboj formu la deziratajn vortojn! La unuaj kaj triaj literoj donas de supre malsupren dirâjon de Johann Heinrich Pestalozzi.

a adz ano bato brilo di di e e ebl eco eks elo er ero Hu ilo io io in ir ismo klez kulo la livo log log ma ma me mili mul ne ni ni nul o o o o ono or pan pekto piko prano pre ri rio sa si sio sio so sta sun sus tas te ten tenco tro zento

1. ........................................ semajnotago
2. ........................................ anaro de kristana religio
3. ........................................ kabo en Hispanio
4. ........................................ donaco el valora metalo
5. ........................................ tropika malsano
6. ........................................ frukto de olearbo
7. ........................................ speco de sinmoviĝo
8. ........................................ sencorgano
9. ........................................ longituda cirklo tra Londono
10. ........................................ konscia kaj klara volo
11. ........................................ arta gravuraĵo sur metalo
12. ........................................ varma zono de la tero
13. ........................................ eventuala afero
14. ........................................ nova, ankoraŭ neniam uzata vorto
15. ........................................ bela vetero
16. ........................................ propriigi al sia korpo sorbitan substancon
17. ........................................ kredo sen certa pruvo pri kulpeco
18. ........................................ lakteca fluaĵo
19. ........................................ alta voĉo de virino aŭ knabo
20. ........................................ scienco pri diaj aferoj
21. ........................................ parto de arbarista hakilo
22. ........................................ granda sportejo
23. ........................................ plivastiĝo

Solvo el septembra SF.:

<u>*Horizontale*</u> 1. rufa 5. vera 8. aviadil' 9. nude 10. ribo 12. enter' 15. tim' 16. monto 18. ikono 20. utila 21. nigra 23. atomo 26. ion 27. leter' 29. kler' 31. dika 32. januaro 33. list' 34. ondo <u>*vertikale*</u> 1. renom' 2. faden' 3. aventur' 4. kaze' 5. vir' 6. elito 7. aromo 11. binom' 13. total' 14. rilat' 17. oriol' 19. katedro 21. nikel' 22. gnejs' 24. orion' 25. omaro 28. enuo 30. rat'






# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkomprenigo**

**jaro 2002 novembro**


## Kiel komplika estas Esperanto?

Ĉu nia ŝatata lingvo vere estas malkomplika? Pravas, ke oni baldaŭ konas la finaĵojn de diversaj vortspecoj. Pravas, ke oni helpe de diversaj sufiksoj kapablas formi novajn vortojn. Tamen oni bone devas pripensi, kion oni skribas aŭ parolas. Ne ĉiam oni rajtas preni iun prepozicion laŭvorte tradukitan el la germana lingvo. Ĉu inter la esprimoj „tra la strato“ kaj „trans la strato“ estas diferenco? Jes, estas. Sed kiu? Kiam ekzistas diferenco inter du diversaj esprimoj kaj kiam ambaŭ diras la samon?

Amase da similaj ekzemploj montris al ni nia estimata instruisto Czesław Baranowski dum la ĉijara semajnfina seminario en Neubrandenburg. Grandparte ni eraris, ĉar nia solvo estis tute malĝuste kaj ofte ni ankaŭ ne sciis, ke iu ajn malkutima esprimo en Esperanto estas tute korekta. Aŭ ĉu vi scias la diferencon inter „kolorigi la muron blua“ kaj „kolorigi la bluan muron“?

Jes, estis vere informriĉa aranĝo dum la lasta oktobra semajnfino en la gastema junular-klubejo. Sed bedaŭrinde venis nur 11 personoj, kiuj travivis amuzajn horojn en amikeca rondo. Kaj ankaŭ por la korpa bonfarto estis zorgata dank' al la geedzoj Ahldorf. Estus dezirinde, se ankaŭ de iom foraj lokoj la samideanoj trovus la vojon al Neubrandenburg. La aranĝo ja delonge estis anoncita en *„Esperanto aktuell“*. Ankaŭ sinjoro Baranowski ne timis la longan vojon de Koszalin.

Do, ankaŭ venontjare okazos semajnfina seminario kaj vi nepre notu la koncernan daton! Legu la informojn pri tio!

Ni funebras pro la forpaso
de nia ŝatata samideano

**Erich Platek**

(2.2.1926 – 21.9.2002)

Li ĉiam havis grandan ĝojon per nia lingvo kaj volonte vizitis E-aranĝojn en multaj landoj, sed antaŭ ĉio en niaj najbaraj landoj. Al Stralsund li flegis regulajn kontaktojn speciale dum sia profesia restado. Li ofte vizitis niajn aranĝojn kaj estis volonte bonvenigata pro sia vigla temperamento. Erich, vi mankos al ni.

**Kiam? Kio? Kie?**

| | | |
|---|---|---|
| Kunveno de la Antaŭpomeria E-grupo: | | |
| mer., la 13an de novembro | 14:30h | „Scheelehaus“ Stralsund |
| Landa Zamenhof-festo: | | |
| sab., la 7an de decembro | 9:30h | „Kurhaus Devin“ Stralsund |
| Pomerania-renkontiĝo | | |
| Iu sabato en majo 2003 | | ie en Pollando |
| Germana Esperanto-Kongreso: | | |
| 6a – 9a de junio 2003 | | Kaufbeuren / Allgäu |
| 25-a Ĉebalta Esperantista Printempo (ĈEP) | | |
| 17a – 25a de junio 2003 | | Mielno / Pollando |
| 26-a Somera Esperanto-Familia/Feria Tendaro (SEFT) | | |
| 2a – 10a de aŭgusto 2003 | | tendejo „Dreetzsee“ / Thomsdorf |

Ŝanĝoj kaj aldonoj eblas. Bonvolu atente legi ĉiujn informilojn!

Kontaktoj en Stralsund: +493831490003 Gun.Eb@t-online.de



Kara Curt,

ĉiuj membroj de la Esperanto-grupo el Stralsund elkore gratulas vin okaze de via

# 75-a naskiĝtago

Ni deziras al vi ĉiun bonan, sanon kaj multan ĝojon en nia esperantista rondo kaj en via propra vivo.

Ekde 1987 vi estas aktiva membro de la Esperanta movado. Vi partoprenis multajn aranĝojn, renkontojn kaj kongresojn ekz. la UK-ojn en Bergen/ Norwegio, Montpeliero kaj Berlino. Kelkfoje vi ĝuis la paskajn festtagojn dum PSI-aranĝoj. Malgraŭ via maljuna aĝo vi ĝuis la tendumadon en Thomsdorf dum SEFT kaj la migradon ĉe la bordo de pola Balta Maro dum ĈEP en Mielno.

Kelkajn jarojn vi prezentis Esperanton per informstando dum la Kulturtagoj en M/V. Bedaŭrinde viaj fortoj ne plu sufiĉas por grandegaj aktivecoj, sed en nia grupo vi restas la motoro por esperantlingvaj kunvenoj kaj ekzercoj.

Tre ofte vi ĝojigis nin kun poemoj kaj legado de esperantlingvaj libretoj. Ni ne forgesos vian laboron en la arbitracia komisiono de la landa estraro de M/V.

***Kara Curt,***

***sanon , ĉion bonan kaj multe da ĝojo en via nova vivojaro deziras al vi la esperantistoj el la tuta mondo kaj ĉefe la Stralsunda kaj Neubrandenburga grupoj.***